


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №  12, Decembro, 2007

# ES „RADOMIR KLAJIĈ“

*Sur la paĝoj de «Saluton!» en 2004-2007 jaroj ni jam konatigis legantojn kun kelkaj E-kolektivoj de partner-urboj de Ŝikago (kiel Milano, Kijivo, Varsovio, Ŝanhajo). Antaŭ nelonge tri novaj metropoloj ĝemeliĝis kun la Urbo-de-odora-cepa-kampo kaj E-societo de la serba ĉefurbo Beogrado nun prezentas sin kaj salutas nin:*



En Beogrado en la jaro 1901. estis notitaj unuaj esperantistoj. Esperantista grupo el 1908 en Beogrado transformiĝis en 1909 en la societon – Serba esperantista societo (Društvo srpskih esperantista). La societo ankoraŭ nun ekzistas. Nuntempa nomo de societo estas „Radomir Klajiĉ“. Radomir Klajiĉ estis unua vicprezidanto de tiama societo kaj tre aktiva esperantisto. Unua prezidanto de societo estis inĝeniero Dragomir Andonoviĉ.

En 1908 kaj 1910 aperis la unuaj Esperanto-lernolibroj en la serba lingvo kaj 1910 aperadis en Beogrado dulingva gazeto „Serba Esperantisto“.

Kvankam Balkanaj militoj kaj Unua mondmilito malebligis esperantan agadon, en 1922. refondiĝis Esperanto societo.

En 1923, okazis unua landa E-kongreso. En 1934. aperis Esperanta-serbokroata vortaro de Stevan Živanović. Multaj beogradaj esperantistoj kunlaboris kun La suda stelo, kiu aperis 1932 en Slavonski brod.

En Dua mondmilito multaj esperantistoj pereis, sed en 1946 denove ekfunkciis nuntempa beograda E-societo. Nun ES havas 50 membrojn, pli aŭ malpli aktivaj, pasintjare estis eldonita libron „ Esperantistoj en Serbio“ kaj nuntempe aperas bulteno „Beograda Verda Stelo“. Jen estas originala poemo Peto (al amiko F-Ero) de la societa aktivulo, laŭreato de literatura konkurso Liro, Dimitrije Janiĉiĉ:

La jaroj sulkigis mian vizaĝon
mi ne similas al mi
la steloj ne plu brilas
en miaj okuloj.
La ŝoseoj ofertas al mi larĝan mondon
sed en mi mortis deziroj.
La tempo de farado de vivbilanco
al ĉiuj al venas.
El saketo de mia vivdaŭro
mi elprenas nur ĉifonetojn
de iama profunda kompreno.
Al mi restis nur tuŝo
de mortintaj rememoroj.
Lasu min eniri en viajn sonĝojn
– ĉar mi ja estas tiel sola.

## El Popola Ĉinio

Laŭ deziro de niaj legantoj nun ni renovigis la unuan paĝon kaj pliriĉigis la enhavon de la retejo, kiu nun havas 12 partojn kun pli 30 rubrikoj: Aktualaj Novaĵoj, Esperantujo, Socio, Kulturo, Ekonomio, Olimpikoj kaj Sporto, Scienco kaj Eduko, Medicino, Vojaĝo tra Ĉinio, Kalejdoskopo, Amikaj Rilatoj, Inter Ni, kaj pli ol 10 specialajn temojn, kiaj UK, Kulturaj Heredaĵoj, 100 Ĉinaj Frazoj por la Olimpikoj en 2008, Koncize pri Ĉinio, Nacimalplimultoj de Ĉinio, Harmonio de Socio, Kuirarto, Por Via Sano, Ŝanhaja Monda Ekspozicio ktp. Ni volas scii: ĉu plaĉas al vi la nova paĝo? Ĉu tiuj rubrikoj estas interesaj por vi? Kiajn artikolojn vi deziras legi? Viaj reagoj estos tre bonvenaj kaj utilaj al nia laboro. Antaŭdankon pro via kunlaboro!

## ANONCOJ

❖Kasisto Karlo Gunn memorigas al klubanoj pri la statuta devo pagi kotizon. Tion vi povas fari dum la Zamenhofa Benkedo.

❖E-isto el Amazonio (Brazilio) petas nin helpi per libroj, revuoj k.a. esperantaĵoj. Dezirantoj helpi povas kunporti siajn aĵojn al Zamenhofa Bankedo kaj transdoni ĉion al sekretariino Gertrude Novak.

❖La sekvanta (Novjara) numero de la bulteno estos dediĉita la la elekto de la societa estraro, Zamenhofa Bankedo kaj verkaro de E. Miĥalski.

## Zamenhofa Bankedo 2007!



Dum la lasta klubkunsido plejmulto de niaj membroj esprimis deziron festi Zamenhofan tagon en ĉina bufedo. Estis trovita Nova Ĉina Budedo (New China Buffet) laŭ adreso: 7310 West Foster Avenue, Chicago, IL 60656.

Ĝi troviĝas sur vendoplaco ĉe stratkruco de W. Foster kaj N. Harlem, nur 1 minuto de la 90a rapid-ŝoseo (elirejo Harlem), konvenaj prezoj (ne pli ol $15), bongusta manĝaĵo, grandega parkejo. Kaj aparta salono je nia dispono (por 3 horoj nur, inter 12.30 kaj 3.30 pt).

Bv informi prez. V. Pajuk pri via veno, venigu niajn malnovajn samideanojn, amikojn, familianojn.

### Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

**Estraro:**
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

### KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

### Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

16an de Decembro – Zamenhofa bankedo – en ĉina bufedo

*Atenton: la programo povos esti ŝanĝata; la prelegontoj estas invitataj.*

